

ENKONDUKO

Pri la vivo de JAMAGA Taiĵi kaj "Lao-cu Esperanta"

1. Renkontiĝo kun Lao-cu

JAMAGA Taiĵi (T.Yamaga), japana esperantisto-anarkiisto 1892~1970, unuan fojon legis la ĉinan folozofan libron "Lao-cu", proksimume en la jaro 1920, kiam li restis en malliberejo en la urbo Kioto, pro krimo de subtera eldonado. Verŝajne li legis la libron el biblioteko en la malliberejo. (La vorto "Lao-cu" indikas kaj la titolon de la libro kaj ĝian aŭtoron, kiu estis antikva ĉina filozofo.)

Kiel JAMAGA klarigas en la antaŭparoloj, la aŭtoro Lao-cu estas antaŭ ĉio homo, kiu kontraŭstaris la abomenindan sistemon de ŝtato kaj moralo.

Laŭ JAMAGA, la libro Lao-cu estas revolucia filozofio kaj anarkiisma pensmaniero el la vidpunkto de orienta mondo. Ĝi montras veran vojon de anarkiismo kaj vivmanieron de anarkiistoj. Ju pli atente JAMAGA studis la enhavon, des pli la ideo ŝajnis al li koincida kun tiu de

anarkiismo.

JAMAGA, malliberigita for de kamaradoj kaj de la anarkiista movado en la ekstera socio, ne-supozeble multe ĝojis kaj miris pro la unika enhavo de la libro Lao-cu. La miro similas al lia unua konsciigo, kiun li spertis okaze de la renkontiĝo kun OOSUGI Sakae (tiama gvida anarkiisto en Japanio), kiam li estis 19 jaraĝa junulo. Kaj lia renkontiĝo kun Lao-cu kondukis lin al pli profunda penso kaj kompreno de anarkiismo.

Li konvinkiĝis, ke anarkiismo ne nur estas unu el la socialismaj skoloj eŭrop-devenaj, sed ĝi estas universala pensmaniero, kiu jam naskiĝis en antikva Ĉinio antaŭ 2400 jaroj. La konvinkiĝo nature igis lin preni la laboron traduki la libron en Esperanton, por ke kamaradoj en okcidenta mondo povu konatiĝi kun ĝi. Malgraŭ kelkfojaj haltoj pro la malfacile komprenebla originalo, kaj pro sia malfacila viv-cirkonstanco, li tamen plenumis la decidon post multe da jaroj.

☆ ☆ ☆

Ni povas karakterizi la ideon de Lao-cu per forta neado kontraŭ antaŭjuĝo, superstiĉo, ku-

timo, moro, kaj stereotipa koncepto pri moralo.

Sed multaj el la studlibroj pri Lao-cu mildigis la esencan kernon de la forta neado. JAMAGA, per sia propra traduko, provis rekte, sen vualo, montri la radikalan neadon kontraŭ ŝtato, socio, feŭdalismo, kaj veki ĉe ni mensan revolucion.

Sur la fundamento de absoluta neado Lao-cu intencis konstrui naturan, vere spontanen "Vojon" kaj "Moralon". Ĉio, kion Lao-cu intencis klarigi en la 81 ĉapitroj de la libro, devenas de la "Vojo" kaj "Moralo", kaj denove revenas al tiuj.

La kerna vorto "Vojo" signifas "Kaosan Neni-econ", "Senfinan Kosmon" aŭ "Ĉies Originon"; nome ĝi samas al anarkiismo.

2. Renkontiĝo kun Esperanto.

La 78jara vivo de JAMAGA Taiji estas unika pro tio, ke ĝi estis konstante ligita kun Esperanto kaj anarkiismo, ekde la unuaj jaroj, kiam ambaŭ movadoj ĝermis en Japanio. Jen sekvas kronologia resumo de la vivo de JAMAGA.

☆ ☆ ☆

▼ 1892, 26an de junio: JAMAGA naskiĝis en la urbo Kioto, kiel 12a ido de la patro Zenbei kaj la patrino Kjo. La patro, unu el la pioniroj de japana tipografio, estis la fondinto de la presejo Tenrin-Do en Kioto.

▼ 1907, 15-jaraĝa: JAMAGA forlasis mezlernejon, kaj venis al Tokio; ekloĝis en la eldonejo Yuraku-Sâ. (La direktoro de la eldonejo, ABIKO Sadaĵiro, estis unu el la fondintoj de Japana Esperanto-Asocio organizita en la jaro 1906. La oficejo de JEA lokiĝis en la eldonejo Yuraku-Sâ.)

▼ JAMAGA lernis Esperanton en la kurso okazigita en la eldonejo, tuj post kiam li dungigis.

(Laŭ la vortoj el la memor-kajero "Tasogare-Nikki" verkita de JAMAGA en liaj vesperaj jaroj, "Komence 30 kursanoj, sed sinsekve multaj ĉesis lerni, kaj fine mi sola restis. Mi lernis la broŝuron "Ekzercaro", kiun la gvidanto KUROITA Kacumi (aŭtoritata paleografo kaj unu el la fondintoj de JEA) uzis en la kurso, kaj mi ankaŭ memlernis la libron verkitan de HUTABATEI Sîmei (enkondukinto de Esperanto en Japanion, novelisto). Mi prenis ankaŭ laborojn en JEA kiel sensalajra sekretario.")

▼ 1910, 18-jaraĝa: La eldonejo Yuraku-Sâ ban-

krotiĝis. JAMAGA eklaboris en la presejo Cukiĵi-Kappan.

(Ankaŭ la oficejo de JEA translokiĝis. "Malvarman matenon en decembro, mi sola portis unu ĉaron da tuta posedaĵo de JEA; skribtablo, vortaroj, libroj kaj diversaj presaĵoj, al la nova oficejo, kiu havis du malgrandajn ĉambrojn. Unu angulo de la oficejo fariĝis mia tranoktejo. Kolektiĝis 5 aŭ 6 esperantistoj en regula kunido, du fojojn monate, inkluzive de OSAKA Kenĵi (fondinto de Japana Esperanto-Instituto), kiu tiam ankoraŭ estis altlernejano. Kiel ne-lerta kompostisto por la latinaj literoj, mi eklaboris en la presejo Cukiĵi-Kappan, kiu presas la organon de JEA: 'La Japana Esperantisto'.")

3. Renkontiĝo kun anarkiismo

▼ 1911, 19-jaraĝa: HARADA Sîntaro, lerta kompostisto en la presejo, aranĝis por JAMAGA renkontiĝon kun OOSUGI Sakae (tiam gvidanto de anarkiista movado en Japanio).

(En la 28a de junio, 1906, 6 tagojn post la fondiĝo de JEA, KOUTOKU Sjusui, socialisto reveninta el Usono, faris epokfaran prelegon pri sindikatismo. La prelego donis gravan turnopunk-

ton al la japana laborista movado, kaj ĝi estis historie la unua deklaro de anarkiismo en Japanio. Kvar jarojn poste, en junio de la jaro 1910, KOUTOKU kaj la kamaradoj estis arestitaj pro la falsa "Majestatenca Krime" elknedita de tiamaj registoj. Multaj kamaradoj estis mortokondamnitaj post nur 6 monatojn da malpublika juĝo. En januaro, 1911, KOUTOKU kaj aliaj estis ekuzekutitaj. HARADA estis konato de KOUTOKU, kaj estis amika precipe kun KANNO Suga (mortokondamnita kiel ĉefkrimulino en la afero). Sed li feliĉe povis eviti areston kaj pseŭdonome trovis laboron en la presejo Cukiĵi-Kappan.

HARADA rekomendis al JAMAGA skribi al OOSUGI. "OOSUGI tuj respondis al mia Esperanta letero. En sekvanta dimanĉo ni rekontiĝis en la ĉiovendejo Micukoŝi. OOSUGI, kun stria jako kaj grandaj okuloj, kuraĝige respondis al mia sinprezento. 'Pres-laboristoj staras en la unuaj vicoj de la revolucia movado. Esperanto estas utila armilo por la unuiĝo de la tutmonda laboristaro.' En la nokto mi ne povis dormi ekscitita pro mia firma decido, ke mi iru sur la vojo de anarkiismo."

Post la "Majestatenca Krime", furiozis severa persekuto fare de la registaro kontraŭ social-

istoj en la tuta Japanio. Postaj historiistoj nomas tiun periodon "vintra periodo". Movadaj aktivuloj kaŝis sin kaj evitis persekuton. Malgraŭ tia malfavora kondiĉo tamen la sorto kondukis JAMAGA al renkontiĝo kun HARADA kaj OOSUGI, kiu hazarde povis eviti la intence kneditan krimon fare de la registoj, pro la fakto ke li restis en malliberejo dum la falsa krime estis knedata. JAMAGA firme metis la unuan paŝon en la vivon kiel esperantisto-anarkiisto.)

▼ 1912, 20-jaraĝa: La polico severe observis JAMAGA. Laŭ la konsilo de OOSUGI, li venis al Kioto. JAMAGA eklaboris en la elektra firmao Okumura-Denki-Sōkai, kaj ellernis elektran teknikon.

▼ 1913, 21-jaraĝa: Al Manĉurio. JAMAGA laboris kiel elektra teknikisto en la kompanio Manŝu-Tecudo, ellernis pekinan dialekton de la ĉina lingvo.

4. Sifo, OOSUGI kaj Eroŝenko

▼ 1914, marto, 22-jaraĝa: Laŭ la letero de OOSUGI, JAMAGA kaŝe iris al Sanktaĵo. Li helpis eldonadon de la gazeto "La Voĉo de la Popolo" fare de Sifo (LIU Shi-fu, ĉina pionira anarki-

isto).

("La subtera eldonejo de 'La Voĉo de la Popolo' havis man-movan presilon kaj kompletojn da litertipoj por Esperanto kaj por la ĉina lingvo. La gazeto eldoniĝis semajne, kun 32 paĝoj inkluzive fotojn, du-lingve en Esperanto kaj la ĉina. La membroj de la eldonejo konsistis el 7 junaj virinoj kaj 10 viroj, krom Sifo kaj lia fratino Mucute. Amaso da laboroj por la semajna eldonado de la gazeto: manuskripti, redakti, komposti, presi, bindi kaj ekspedi, postulis superhoman labor-streĉon de Sifo. Mi eklaboris tuj por la Esperanta parto de la gazeto.")

▼ 1914, oktobro: OOSUGI leteris al JAMAGA, ke li komencos eldoni la organon de japanaj anarkiistoj "Heimin-Sinbun (la tria)". JAMAGA revenis Japanion por helpi la laboron.

(La organo ricevis severan malhelpon fare de la registaro. Prohibicio kaj konfisko sinsekve minacis ĝin ekde la unua numero ĝis la lasta. Ĝia eldonado devis esti ĉesigita ĉe la 6a numero. OOSUGI forvendis sian posedaĵon, sed li ne povis nuligi la grandan ekonomian ŝuldon.)

▼ 1915, 23-jaraĝa: JAMAGA loĝis ĉe OOSUGI kun AISAKA; vendis malnovajn librojn surstrate; sub-

tere eldonis la broŝuron "Al la Junuloj" verkita de KROPOTKIN; formis grupon anarko-esperantistan kune kun HUKUTA Kunitaro kaj AISAKA.

(Tiutempe venis EROSENKO al Japanio. Denove vigliĝis Esperanto-movado en Japanio.

"Du fojojn monate oni havis regulan kunsidon en kafejo en Ginza. Ĉiŭfoje ĉeestis OSAKA Kenĵi, CIFU Tosio, HUKUTA kaj JAMAGA. Foje partoprenis KUROITA, TAKUSARI Kouki (inventinto de stenografio), NAKAMURA Cuneo (estro de meteorogia observatorio) kaj EROSENKO. EROSENKO akompanata de KAMICIKA Iĉiko (ĵurnalistino) ofte ĉeestis la "stud-kunsidon" organizitan de OOSUGI. Kiam li prelegis pri la rusa anarkiisto KROPOTKIN, kun kiu li renkontiĝis en Londono, interpretis HUKUTA.")

5. KUROITA, KITA Ikki kaj malliberejo

▼ 1916, januaro, 24-jaraĝa: Pro tio ke OOSUGI translokiĝis al Zuŝi, en la gubernio Kanagaŭa, JAMAGA, perdinta loĝejon, ekloĝis ĉe KUROITA.

(Tiam la oficejo de JEA troviĝis ĉe KUROITA, JAMAGA helpis laborojn en la oficejo.)

▼ 1916, junio: JAMAGA gastigis ĉe KITA Ikki, japana ultranaciisto subtenanta ĉinan revolu-

cion.

(La policano AKIBA estis respondeca pri JAMAGA kaj KITA. AKIBA ofte parolis pri KITA.

"KITA, konvinkita pri la ideo de Esperanto, invitis min loĝi ĉe li. Tiam ĉefo de ĉina militista klano TAN Ren-feng loĝis en proksima hotelo, por iel akiri monon por sia agado helpe de KITA. Mi loĝis en la hotelo kiel nominala gardisto, kaj ĉiutage vizitis KITA.")

▼ 1916, **sepembro**: Kun la helpo de la policano AKIBA, JAMAGA edziĝis al Mika, 21-jaraĝa, kiu estis helpantino pri hejmaj laboroj ĉe KITA. JAMAGA eklaboris en fabriko por disko-nadlo. Mika kaj li komencis vivi kune en la angulo de la fabriko.

▼ 1917, **25-jaraĝa**: Mortis frato de JAMAGA en februaro. JAMAGA kaj Mika venis al Kioto. En aprilo mortis la plej aĝa frato Kumejiro. JAMAGA ekloĝis en Kioto kaj helpis laborojn en la presejo Tenrin-Do.

▼ 1919, **27-jaraĝa**: 27an de januaro, JAMAGA estis arestita pro subtera eldonado de libroj "Konkero de Pano" (Kropotkin), "Sindikatismo" kaj "Evangelio de la horo". Li estis kondamnita 3 jarojn da pun-laboro.

▼ 1920, **28-jaraĝa**: JAMAGA legis la libron

"Lao-cu" en malliberejo en Kioto. Li havis fortan impreson, kaj decidis iam traduki ĝin en Esperanton. Li inventis sian propran stilon de kaligrafio por la latinaj literoj.

6. Tri fojojn da vojaĝo al Ĉinio kaj post la morto de OOSUGI

▼ 1921, **29-jaraĝa**: JAMAGA liberiĝis el malliberejo en septembro; loĝis en la vilaĝo Yamaŝina-Hinooka. Liaj anarkiistaj kamaradoj, HISAITA Unosuke kaj UADA Kjutarō instigis lin veni al Tokio.

▼ 1922, **30-jaraĝa**: En junio JAMAGA fuĝis el la vilaĝo; loĝis en Hongo, Tokio, sub pseŭdonomo. Dum tri jaroj post tiam, la polico ne povis kontroli lin. Neniu policano postsekvis lin.

▼ 1922, **julio**: JAMAGA iris al Sânhajo kun JOŜIDA Pin por eniri Sovetion.

(TOKUDA Kjuici, promesinta ke li donos necesan monsumon por la vojaĝkosto al JAMAGA, jam foriris al Japanio kun la mono. JAMAGA ne povis efektivigi la planon. Li amikiĝis kun ĉinaj kamaradoj; aliĝis al ĉinaj anarkiistaj grupoj, kiel sola japana anarkiisto; revenis al Japanio en oktobro, akompane kun HUANG Ling-shuang.)

▼ 1922, novembro: OOSUGI planis partopreni en Anarkiista Internacio en Francio. JAMAGA vojaĝis al Sânhajo por iel akiri pasporton por la uzo de OOSUGI.

(En Pekino li denove renkontiĝis kun ERO-SENKO.)

▼ 1923, 31-jaraĝa: En la 5a de januaro JAMAGA adiaŭis al OOSUGI ĉe Sânhajo; atingis Tokion en la 9a. En la 10a naskiĝis la unua filino, kiun li nomis Aino (A-ino).

▼ 1923, septembro: Okazis la Granda Tertremo en la distrikto Kanto. JAMAGA ekloĝis en malriĉula kvartalo en Senĵu, Tokio, kaj fariĝis provizora ĉarpentisto. OOSUGI Sakae, ITO Noe (edzino de OOSUGI) kaj Soiĉi, nevo de OOSUGI, estis buĉitaj de ĝendarmoj en la kaoso post la Granda Tertremo.

(La komunistoj en Moskvo misinformiĝis, ke buĉita estis **SAKAI** Tosihiko, anstataŭ **SAKAE** OOSUGI. Komence ili funebris, sed post la malkovriĝo, ke mortis la anarkiisto OOSUGI Sakae, ili demagogis ke OOSUGI estis spiono. JAMAGA sendis detalan informon kaj montris la veron al eksterlandaj kamaradoj. Okazis manifestacioj kontraŭ la japana registaro, en Usono, Francio, Germanio, Italio, Nederlando, Svisio, Svedio,

Norvegio, Portugalio kaj Meksikio.)

▼ 1924, 32-jaraĝa: UADA Kĵutaro kaj MURAKI Genĵiro, kamaradoj de OOSUGI, provis pafmortigi la generalon HUKUTA, kiu estis la ĉef-komandanto dum la sieĝostato post la Granda Tertremo, por venĝi la buĉon de OOSUGI. La provo malsukcesis. Rilate al la afero JAMAGA arestiĝis en septembro. Li estis malliberigita dum 29 tagoj, sed la polico ne povis akuzi lin pro lia insista silentado. Poste, li aktivis publike.

▼ 1925, 33-jaraĝa: En la 6a Unuamaja Tago JAMAGA havis la taskon de vic-komandanto, reprezentante japanajn anarkiistojn. Partoprenis 20,000 laboristoj.

▼ 1925, septembro: JAMAGA eldonis "Konversacian libron por la japana, Esperanta, la ĉina, kaj la angla lingvoj" el la eldonejo Kiŝigami-Daido-Sâ. Ĝi havis 116 paĝojn, en B6-fromato, kostis 1 enon.

▼ 1927, 35-jaraĝa, marto: JAMAGA proponis kaj sendis anarkiistan reprezentanton al la "Kongreso de Pan-pacifikaj Laboristaj Sindikatoj".

(Tiu ĉi kongreso estis dekomence manipolata por propaganda celo, fare de komunistoj. Pro tiu fakto JAMAGA estis kritikita de siaj kamaradoj dum la raporta kunveno de la reprezentanto.

Komenciĝis insultado al sindikatismaj anarkiistoj fare de "puraj" anarkiistoj. Du jarojn poste, japana anarkiista laboristo-movado skismis en du partojn.)

▼ 1927, aŭgusto: JAMAGA estis invitita de Nacia Universitato por Laboristoj en Sânhajo, kiel instruisto de Esperanto. Li iris al Cînio kune kun ISIKAUA Sanŝiro kaj IUASA Sakutaro (japanaj famaj anarkiistoj), kiuj ankaŭ esits invititaj de la universitato. JAMAGA revenis Japanion en decembro.

▼ 1928~30, 36~38-jaraĝa: La presejo Tenrin-Do en Kioto frontis ekonomian malfacilon, kaj la direktoroj forvendis la presejon por kovri la ŝuldon. JAMAGA perdis laboron ĉe la ĵurnalo-kompanio Advertiser, ĉar la kompanio brulis. Perdinte esperon pro la skismo en la anarkiista movado, li forlasis Tokion, kaj fariĝis instruisto de Esperanto ĉe lernejo por virinoj en la urbo Kii-Nagaŝima, sed tuj la lernejo fermiĝis. JAMAGA fariĝis mastro ĉe kafejo en Kioto, helpe de sinpatianto al anarkiismo.

7. En la urbo Koganei

▼ 1931, 39-jaraĝa, aprilo: JAMAGA konstruis

novan domon en Koganei, ĉirkaŭurbo de Tokio; forlasis Kioton, kaj ekloĝis en la nova domo. Por la konstruado li utiligis la sumon, kiun li akiris per la forvendo de la presejo Tenrin-Do. Li dungigis en la presejo Tanŝiki-Insacu en Sîbaura, Tokio.

(Kiam li ricevis la sumon, la gefratoj insistis, ke li nepre aĉetu terenon kaj domon por sekurigi la vivon de la edzino kaj la gefiloj. JAMAGA konsentis la konsilon. "Tiutempe abundis reklamoj pri tereno sur ĵurnaloj. Mi trovis konvenan proksime de la stacidomo Koganei. Ĝi kostis mil enojn. La tereno havis arbojn kaj bonan puton. Mia bofrato estis ĉarpentisto, kaj li afablis konstrui domon per la sumo de mil enoj.)

▼ 1936, 44-jaraĝa, julio: Okazis Hispana Revolucia Milito. JAMAGA aktivis kiel japana ĉefsekretario en la helpo-buroo por CNT/FAI.

▼ 1937, 45-jaraĝa, aprilo: Lanti, fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), vizitis Japanion.

(JAMAGA kaj Lanti konsentis malmultkoste eldoni Plenan Vortaron en redukta formato, ĉe la presejo Tanŝiki-Insacu. Sed la plano fiaskis pro tio, ke Lanti ne sendis monon.)

▼ 1939, 49-jaraĝa, marto: Eldoniĝis "Maljuna Majstro", kiu estas prototipo de "Lao-cu Esperanta". JAMAGA foto-ofsete kopiis la mane skribitan manuskripton; bindis kaj eldonis 100 ekzemplerojn.

▼ 1939, junio: JAMAGA estis arestita pro subtena laboro por La Popola Fronto en Hispanio.

(Dum li pasigis tempon en Koganei, japana socio rapide kliniĝis al mitalismo. Preskaŭ ĉiuj revoluciaj movadoj estis silentigitaj. Ok jarojn poste, JAMAGA decidis forvendi sian tutan posedaĵon kaj migri kun siaj familianoj al Tajvano, kiu tiam estis la plej suda insulo en Japanio. Sed dum la 8 jaroj de tiu ĉi periodo, JAMAGA pasigis vere sian propran anarkiistan tempon kun siaj familianoj. Ekzemple, kun la du gefiloj li bredis anasojn; havis drogĝardenon; elfosis kaj ekspoziciis antikvajn argilaĵojn; observis astrojn per teleskopo kiun li mem faris; provis stereoskopian foton; inventis novan paper-falditan lud-aviadilon ktp. Kaj kompreneble li ankaŭ faris multajn laborojn por Esperanto.

Li koncentriĝis al la tradukado de la libro Lao-cu en Espernton. Li penis fini la laboron pendatan jam dum multaj jaroj. Ĉiutage dum 4

horoj en vagonaro al la kompanio kaj revenvoje al sia hejmo, li laboris por la polurado de sia prov-tradukaĵo. La manuskripto pretiĝis post 5 jaroj.)

8. Dum kaj post la Milito

▼ 1939, 47-jaraĝa, septembro: JAMAGA vendis la tutan posedaĵon en Koganei. Laŭ la jam decidita plano, li metis la unuan paŝon en la urbon Takao (Gaoxiong) en Tajvano kun siaj familianoj, por migri el Japanio.

▼ 1942, 50-jaraĝa: JAMAGA estis rekviziciita en Tajvano; eklaboris por japanlingva ĵurnalo en Filipinio.

▼ 1944, 52-jaraĝa: La situacio de japana armeo fariĝis malprospera. JAMAGA revenis al Tajvano, kaj evakuiĝis al la centra parto de Tajvano, dank'al la helpo de LIAN Wen-quiring.

▼ 1945, 53-jaraĝa: Kapitulaco de Japanio. JAMAGA fondis la lernejon Taiŭan-Jĵu-Sâ en la urbo Takao.

▼ 1946, 54-jaraĝa, aprilo: JAMAGA revenis al Japanio pro viv-malfacilo; eklaboris en la presejo Benri-Do en Kioto. Li aliĝis al Japana Anarkiista Federacio (JAF) nove fondita; fariĝis

respondeculo ĉe la buroo de la federacio en Kioto por la organo Heimin-Sinbun.

▼ 1954, 62-jaraĝa, februaro: JAMAGA translokiĝis al la urbo Iōikaŭa, en la gubernio Ciba; fariĝis la respondeculo de internacia fako de JAF; eldonis novaĵ-bultenon en Esperanto; aliĝis al War Registers' International (Internacio de Militrezistantoj: WRI).

▼ 1956, 64-jaraĝa: JAMAGA estis honorigita en la 50a Tutlanda Kongreso de Japanaj Esperantistoj, pro la pionira laboro por Esperantomovado en Japanio.

▼ 1957, 65-jaraĝa: Victor GARCIA, hispano elmigrinta en Venezuelon, venis al Japanio. Kune kun li JAMAGA vizitis kamaradojn en okcidenta parto de Japanio dum 50 tagoj.

▼ 1960, 68-jaraĝa: JAMAGA partoprenis en la Internacia Kongreso de WRI, okazigita en Hindio; estis honorigita kiel kontribuanto por pacmovado.

▼ 1961, 69-jaraĝa, decembro: JAMAGA falis pro cerba hemoragio; suferis maldekstran hemipleĝion.

▼ 1962, 70-jaraĝa: JAMAGA eldonis sian japanan tradukaĵon de Lao-cu en du volumoj.

(Tamen sen Esperanta parto. JAMAGA aldonis al

la japanan tradukaĵon sian komendarion. Farita mimeografie, en formato B6, eldonita el PBK-librejo en Kobe.)

▼ 1962, aŭgusto: Hispan-lingva tradukaĵo de Lao-cu "Lao-Tse" eldoniĝis en Meksikio.

(Tiu ĉi hispana versio baziĝas sur la Esperanta prov-tradukaĵo fare de JAMAGA. Li donis unu kopion de sia Esperanta manuskripto al GARCIA, kiu intencis eldoni ĝin en la hispana lingvo. La libro estis malgranda buroŝuro (10cm x 15cm, 117paĝoj). La tradukinto estis Edvardo VIVANCOS el Toronto, Kanado, eksaktivulo en Hispana Revolucia Milito. La antaŭparolo en la libro traktis la historion de anarkiista movado en Japanio, ekde ANDO Sjoeki, kiu estis anarkiisteca ideologo dum feŭdalisma erao en Japanio. Tridek ses paĝoj estis distinitaj por priskribi la vivon de JAMAGA. La libro eldoniĝis kiel unu el la serio de "Historio de Anarkiismo" de la eldonejo "Tero kaj Libero (Tierra y Libertad)".)

▼ 1966, 74-jaraĝa: JAMAGA ĉesis verki la memor-kajeron "Tasogare-Nikki", kiun li ekverkis en la jaro 1962, ekde kiam li malsaniĝis. Entute 92 ĉapitroj. Lia lasta skribaĵo "Esperantisto JUI Cĵunoŝin kaj lia sinmortigo" aperis sur la decembra numero de japana anarkiista organo

Jiju-Rengo.

▼ 1970, la 6a de decembro: Forpasis JAMAGA 78-jaraĝa.

9. Suplemente al Lao-cu Esperanta

Générale JAMAGA ellaboris ĉion tre rapide. Sed la tradukado de la libro Lao-cu postulis de li multajn jarojn. Post la decido en la malliber-ejo pasis 18 jaroj, kaj en la jaro 1939 la unuan fojon aperis la verko "Maljuna Majstro" kiel memfarita eldono, tuj 6 monatojn antaŭ la "Migro el Japanio". Pro la jam antaŭe decidita plano migri el Japanio, li rapidis eldoni sian tradukaĵon. Do, la libro "Maljuna Majstro" povas esti provizora eldono.

Post la morto de JAMAGA, Mi eltrovis pli ol dek valiantajn manuskriptojn por la traduko. Ĉiuj el ili estis dense retuŝitaj kaj abundis mane aldonitaj frazoj, kio montras la grandan penon fare de JAMAGA.

Ekzemple, la komenca frazo de la unua ĉapitro ŝanĝiĝis laŭ la manuskriptoj, kiel ni vidas sube:

★1939 - La vojo kiu estas esprimebla kiel la

vojo ne estas ĉiama vojo.

★1957 - La vojo esprimebla ne estas ĉiam-vojo.

★1962 - La vojo, kiu estas esprimebla, ne estas porĉiama vojo.

Verŝajne la granda malfacilo de la originalo kaŭzis tian multfojan retuŝon. La libro Lao-cu estas versaĵo en antikva Ĉinio. Kaj ĝiaj koncizaj frazoj naskis diversajn manierojn por kompreni ilin. Preskaŭ ĉiuj el la studlibroj pri Lao-cu ne kontentigis lin.

Antaŭ ol traduki ĝin en Esperanton, necesis laŭvorte traduki japanen, por ke li povu trafe kompreni ĝin.

☆ ☆ ☆

En la antaŭparolo JAMAGA diras, "De malnovaj jaroj multaj tradukis la libron de Lao-cu, sed el ili multaj jam de la unua ĉapitro miskomprenis kaj erartradukis la tekston. Mia majstro Sŭten INOUE, en sia verko "Nova Studo pri Lao-cu", studis variantajn librojn, kompare korektis... kaj li indikis iliajn mistradukojn... kaj la aŭtoro kredas, ke lia vidpunkto devas esti la plej korekta, do tie ĉi mi tradukis bazante min sur lia traduko"

"Nova Studo pri Lao-cu" de INOUE Sûten estis ĝuste tia libro, kian JAMAGA bezonis. Li akiris ĝin hazarde en vendejo por malnovaj libroj.

JAMAGA letere faris demandojn al Sûten, eĉ foje vizitis lin ĉe la hejmo en la urbo Kobe. Tio estis granda helpo por lia traduka laboro.

Pri Sûten oni scias nur tre malmulte. Li iam estis membro de loka grupo de socialistoj en Kobe, proksimume en la jaro 1908; verkis artikolojn sur la informilo de la grupo. Okaze de la Majestatenca Krime en la jaro 1910, ne nur gvidaj aktivuloj de la grupo, sed ankaŭ li estis arestita de la polico. Kvankam li, ŝajne pro la socia rango ke li estis profesoro en la universitato Kansei-Gakuin, liberiĝis post ne longe, la polico tamen metis lin sub severa kontrolo dum longa tempo.

Sûten studis budhismon, kaj tradukis librojn en la anglan. Kvankam liaj laboroj estas konataj ekster Japanio, li restis inter popolanoj dum la tuta vivo.

Estas tamen interese, ke JAMAGA kaj Sûten ne sciigis pri ilia ligiteco per socialisteco reciproka. Nur "Lao-cu" ligis ilin.

Aldone ĉe la fino

Tiun ĉi libron eldonis JAMAGA Mika kaj SEGAUA Aino. MUKAI Kou kaj HUJIMAKI Ken'ichi efektivigis la eldonadon. TANI Hirojuki helpis la laboron. JAMAGA Mika, 97-jaraĝa ankoraŭ estas tre vigla. Eĉ du-tri horojn da intervjuo ne lacigas ŝin. Ŝia memoro ankoraŭ restas klara. SEGAUA Aino, filino de JAMAGA, prizorgas la Bibliotekon de JAMAGA (Uĉiura-Mito 544, Numazu, 410-02) kun siaj familianoj.

En la lasta somero ITO Rui, la kvara filino de OOSUGI kaj ITO Noe, vizitis JAMAGA Mika la unuan fojon. "Mia patrino Noe aĝus simile al Mika, se ŝi ankoraŭ vivus." La vortoj de ITO Rui klare rememorigis min pri "la historio".

En novembro, 1922, JAMAGA forlasis Japanion al Ĉinio, laŭ la peto de OOSUGI, por iel akiri pasporton por li, kiu intencis iri al Francio. Mika, tiam graveda, restis sola en Japanio. Dum la foresto de JAMAGA Taiji, Noe, du jarojn pli aĝa ol Mika, prizorgis ŝin, kaj preparis por ŝia nasko.

En la 9a de januaro 1923, JAMAGA revenis al Japanio, kaj tuj en la sekvanta tago, en la 10a, naskiĝis la unua filino Aino. En la Biblioteko

JAMAGA ni havas unu foton, sur kiu aperas Mika kaj ŝia bebo, kiu portas blankan ĉapon kun krispo. La ĉapo fariĝis memor-donaco de Noe, kiu estis mortigita kun OOSUGI kaj Soiĉi nur 9 monatojn poste.

Gŭste pasis 100 jaroj post kiam JAMAGA Taiji naskiĝis en la jaro 1892, kaj 22 jaroj post lia forpaso en 1970. Mi tre ĝojas, ke lia verko, por kiu li dediĉis multajn jarojn, eldoniĝas en tiu ĉi jaro 1992.

--MUKAI Kou--

La originala esperantigita teksto de JAMAGA enhavas multajn laŭvortajn tradukojn kaj arbitre uzitajn verboformojn, kiuj estas miskomprenigaj kaj eĉ nekompreneblaj. Ni faris minimumajn gramatikajn korektojn (ĉefe pri la konfuzo de verbo-uzoj, mallogikaj verbofinaĵoj, misuzo de kelkaj pronomoj) Sed ni ne tuŝis la fundamentajn vortprovizon kaj frazstilon de lia traduko. Ni kredas, ke tio ne spitas al la volo de JAMAGA, kiu mem, dezirante ke plejmultaj konu kaj legu la libron, "provis traduki jam tri fojojn, sed ankoraŭ ne kontentas." --Tani kaj Huĵimaki--